## Novjara epistolo de ‘Abdu’l-Bahá

[Revelaciita por amerikaj kredantoj en 1906, kiuj estis sendintaj al ‘Abdu’l-Bahá novjaran saluton;
‘Abdu’l-Bahá, Tablets of Abdu'l-Baha, vol 1, Chicago 1909, p. 39]

Ho vi, idoj de l’ Regno!

Estas novjaro, tio estas: jara ciklo finiĝis. Jaro signas ciklon de la suno. Sed nun estas la komenco de ciklo de l’ Vero, Nova Ciklo, Nova Jarcento, Nova Tempo kaj Nova Jaro. Tial estas ĝi ege benata.

Mi deziras ke tiu ĉi beno montriĝos kaj manifestiĝos en la vizaĝoj kaj karakteroj de la kredantoj, tiel ke ankaŭ ili fariĝos nova popolo kaj, trovintaj novan vivon kaj baptitaj per fajro kaj spirito, transformos tiun ĉi mondon en novan mondon, tiel ke la malnova tero pereas kaj aperos nova tero, ke malnovaj ideoj foriras kaj novaj pensoj venos, ke malnovaj vestoj estas formetataj kaj novaj vestoj surmetotaj, ke estas forĵetata antikva politiko kies fundamento estas milito kaj levos la standardon de l’ venko moderna politiko bazita sur paco, ke la nova stelo glimos kaj brilos kaj la nova suno iluminos kaj radios, ke floroj novaj floros, ke printempo nova verdos, ke voĉo nova leviĝos kaj ĝia sono nova atingos la orelojn, ke novo sekvos novon kaj ĉiuj malnovaj garnituroj kaj ornamoj estas forigataj kaj anstataŭotaj per novaj dekoroj.

Mi deziras por vi ĉiuj ke vi havos tiun ĉi grandan asiston kaj partoprenos en tiu ĉi granda malavaro kaj ke spirite kaj kore vi strebos kaj penados ĝis kiam la mondo de l’ milito fariĝos mondo de l’ paco, la mondo de l’ malhelo fariĝos mondo de l’ lumo, satana miskonduto transformiĝos al konduto ĉiela, tio ruinigita estos rekonstruata, la glavo fariĝos oliva brancĉo, la hatofulmo fariĝos flamo de l’ amo Dia kaj la bruo de pafiloj la voĉo de l’ Regno, la soldatoj mortigaj la soldatoj de l’ vivo, ĉiuj nacioj de la mondo unu nacio, ĉiuj rasoj kiel unu raso kaj ĉiuj naciaj himnoj unu harmonia melodio.

Tiam tiu ĉi restadejo fariĝos Paradizo, la tero Ĉielo kaj la mondo satana fariĝos la mondo de l’ Anĝeloj.

[provizora traduko: Bernhard WESTERHOFF]